

1943-1945 videt ensidirenen!

gb.

# bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXI

SOFIA, 25 JANUARO 1940

1

## EN LA KOMENCO DE NIA AGADO

Nia nova asocia jaro jam delonge komencis. La kongreso de bulgaraj esperantistoj en Pleven pasis. Oni elektis novan Centra-n komitato-n. Granda laboro nin atendas, vasta kampo antaŭ ni etendiĝas. Bedaŭrinde, la cirkonstancoj por ampleksa laboro estas tre malfavoraj. La 1-an de septembro eksplodis nova milito, kruela kaj detrua. La milito ne ĉesis, sed pligrandiĝas kaj novaj ŝtatoj estas minacataj de riunigo kaj detruo. Ni troviĝas sub la influo de la milito. Vere, ni ne partoprenas en ĝi, ni estas neŭtralaj, sed ni troviĝas en Eŭropo kaj la milito estas tre proksime ĉe ni. En tia militŝtato ni komencas nian novan asociaron. La kaso de la asocio estas en krizo. La enspezoj estas tre malgrandaj. Pro tio la apero de „Bulgara esperantisto“ malfruis. Nia unua tasko kiel bonaj esperantistoj estas kolekti abonojn por la gazeto kaj sendi al la Centra komitato la kolektitan sumon. Dua tasko estas kolektadi novajn membrojn kaj sendi la kotizojn al la Asocio. Tion ni faru senprokraste!

Denove ni devas substreki ke la nuna momento estas malfavora por idea laboro. Tio malgraŭ ĉio ne devas malkuraĝigi nin. Ankaŭ nun ni povas labori senĉese kaj ni atingos nesupozeblajn rezultojn. Sed ni devas agi ne hazarde, sensisteme kaj senplane. Tute kontraŭe, en ĉiu nia ago ni devas rimarki tuj sistemon kaj planon.

Nia Ministerio de popola klerigo postulas de la instruantoj en privataj kursoj havi permesilon por instruado. Ĝi anoncis programon por la esperanto ekzameno. La instruantoj de esperanto, la kursgvidantoj, devas posedi tian permesilon. Pro tio ili devas aperi antaŭ la komisiono ne unuope, sed amase. La 25-an kaj 27-an de oktobro, j. k. aperis du gesamideanoj: Zora Mladenova — Hans kaj Georgi Dimov, ambaŭ el Varna. La du kandidatoj bonege prosperis kaj donis brilajn respondojn kaj rezultojn. Ni esperu ke dum la junia ekzameno 1940 aperos ne nur du gesamideanoj, sed multoble pli. Tiamaniere la Ministerio konvinkiĝos ke esperanto movado vivas kaj kreskas, ke ĝi ne estas utopio de unuopaj personoj, sed vivanta realeco de multnombra movado. Ni laboru tiudirekten!

Ni substrekas denove, ke en la komenco de nia nova asociaro ni intense kaj senĉese devas propagandi por esperanto. Ni malfermu kursojn gvidatajn de laŭleĝaj instruantoj! Ni komencu de nun prepari nin por esperanto-instruantoj laŭleĝaj! Ni daŭrigu nian laboron organizante prelegojn, esperanto-semajnojn, vesper-kaj matenfestojn! Ni eldonu propagandfoliojn, broŝurojn k. c.! Ni havigu al la bibliotekoj novajn librojn. Ni plivigligu la societatan vivon kaj instigu la novajn samideanojn al fruktodona laboro!

I. S.

703.453 - C. Esp  
21-24  
1940/41 - 1946

HRISTO BOTJOV

## LA PENDIGO DE VASIL LEVSKI

*Ho panjo mia, patrio kara,  
Kial vi ploras tiel ĉagrene?  
Kaj korvo, malbonsignanta birdo,  
Al kies tomb' ci grakas malbene?*

*Mi scias, scias — vi ploras, panjo,  
Tial ke labor' sklavinino estas,  
Tial ke via sankt' voĉo, panjo,  
Senhelpa estas, kvazaŭ dezertas.*

*Ploru! Proksime ĉe urb' Sofia  
Pendigilon mi vidis starantan,  
Kaj via nura fil', Bulgario,  
Bravulo pendis, tro suferanta.*

*La korvo grakas malbonsignante,  
Hundoj kaj lupoj en kamp' hurlegas,  
La maljunuloj Dion petegas,  
Virinoj ploras, knaboj kriegas.*

*La vintro kantas minacan kanton,  
Pelas en kampar' dornojn la ventoj,  
Froston, malvarmon, senesper' ploron  
Alblovas en kor' bravul' turmentoj!*

El bulgara tradukis IV. SARAFOV

*Ho, panjo mia, kara nasklando,  
Kial vi ploras tiel dolore?  
Ho, korvo nigra, birdo grakanta,  
Pri kies mort' vi krias furore?*

*Mi scias, scias, panjo, vi ploras,  
Ĉar vi ja estas nigra sklavinino,  
Ĉar via krio, panjo, dolora  
Formortas en dezerto sen fino...*

*Ho tie apud urbo Sofio  
Jam pendigilon starigis morto,  
Kaj unu via fil', Bulgario,  
Je ĝi ekpendis kun granda forto.*

*La korvo grakas mortopromese,  
Sur kampoj hurlas lupoj kaj hundoj,  
La maljunuloj preĝas senĉese,  
Virinoj ploras, idoj singultas.*

*La vintro kantas kanton koleran,  
Tra l'kampoj ventoj pelas la dornojn,  
Glacia frost' kaj plor' malespera  
Al via koro blovas doloron!*

Tradukis el bulgara IV. DOBREV



SVETOSLAV MINKOV

# LA AMERIKA OVO

Profesoro Chester Chasterton loĝis en la kvindekoka etaĝo de unu New-Jork'a konstruaĵo. Li estis fama scienculo: vera profesoro kun okulvitroj, kun blanka barbo kaj kun larĝe kudritaj vestoj. Kiel ĉiu pursanga amerikano, profesoro Chasterton ŝatis ne nur la sciencon, sed ankaŭ la sporton — jen pro kio li estis neordinare sana homo, kvankam depost la tago de lia naskiĝo forpasis ĝuste sesdek kvin jaroj. Krom la multaj sciencaj aparatoj, en la kabineto de la sinjoro profesoro estis ankaŭ ĉiaj instrumentoj por gimnastikaj ekzercoj, inter kiuj plej gravan lokon okupis la ferhalteroj de cent kilogramoj. Nia scienculo levis ilin tute libere super sia kapo per du fingroj. Cetero, ĉiuj-ĉi detalaĵoj estas tute superflujaj, ĉar nia rakonto estas konstruita sur okazintaĵo, kiu prezentas al ni la sinjoron profesoron ne kiel sportiston, sed kiel genian homon de la scienco.

Do, aŭskultu. Kiam la mondĵurnaloj publikigis la novaĵon pri la sukceso de la profesoro Chester Chasterton, ĉiuj scienculoj de ĉiuj landoj de la terglobo sendis saluttelegramojn al sia amerika kolego. En Ameriko mem tuj formiĝis tricentdeksep societoj, kiuj celis elpensi la plej originalan jubileon de la profesoro. Sed tiuj-ĉi tricentdeksep societoj devis ŝanĝi tre baldaŭ sian celon kaj prizorgi la plej solenan enterigon de la jubileulo. Ĉar profesoro Chester Chasterton ne povis travivi la ekscitiĝon kaj mortis pro subita krevo de la koro.

De tie-ĉi komencas la rakonto.

Unu majan matenon profesoro Chester Chasterton sidis en ĥalato en sia kabineto de la kvindekoka etaĝo kaj turnis laŭ malnova kutimo la ferhalterojn, kiam la pordo de la ĉambro malfermiĝis tute neatendite kaj la maljuna servisto Jack eniris internen kun granda pleto en la manoj. En la mezo de tiu-ĉi granda arĝenta pleto oni vidis malgrandan leteron en blanka koverto.

Jack devis atendi tutajn kvin minu-

tojn, dum lia mastro finos sian ekzercon. Nur tiam la profesoro Chasterton vidis sian serviston, alproksimiĝis al li, prenis la leteron, malfermis ĝin kaj legis:

Estimata sinjoro profesoro,

Nedelonge, ĉe elfosoj en Bolivio, ni trafis ion tre interesan, kion vi havos okazon vidi tre baldaŭ per viaj propraj okuloj. Ni, du bravaj usonanoj, laboris ĉe eŭropa ekspedicio, konsistanta el holandanoj, germanoj, francoj kaj kelkaj aliaj eŭropanoj. La trovaĵon, pri kiu estas la vorto, ni malkovris tridek kilometrojn sudoriente de Kohalamba kaj malgraŭ ĉiuj penoj de la eŭropanoj deteni ĝin por si, mi kaj mia amiko ŝtelis ĝin ankoraŭ la saman nokton, forlasis la ekspedicion kaj nun ni estas survoje al New-Jork'o. Post unu-du tagoj certe ni estos ĉe vi kaj tiam vi ekscios pli da detalaĵoj.

Vivu Usono!

Akceptu niajn korajn salutojn kaj sinceran estimon.

U. V. H.

Profesoro Chester Chasterton tenis longan tempon la leteron en siaj manoj, poste delasis sin en felan apogseĝon ĉe sia labortablo kaj restis tiel enpensigite, ĝiskiam la horloĝo sonis por tagmezo. Tiam la sin'oro profesoro vestiĝis kaj iris por tagmanĝi. Post la tagmanĝo li pasigis du horojn en dormo poste li ree eksidis en sia apogseĝo kaj pensis ĝis la vespero. Je la deka horo la maljuna scienculo vestiĝis oficiale kaj iris en la klubon de la profesoroj, kie li renkontis kelkajn el siaj kolegoj kaj montris al ili la leteron.

Ĉiuj estis embarasitaj, ĉiuj kunvenis ĉe la longa nigra tablo kaj parolis ĝis noktmezo pri la enigma trovaĵo en Bolivio. Kelkaj dekduoj da havanaj cigaroj nebuligis la vastan salonon per densaj nuboj da fumo. La ruĝaj kalvaj kapoj de la profesoroj brilis en la lumo de la peza kandelabro, povante elpensi nenion. Ĉar ne eĉ unu el la ĉeestantoj donis ian sol-

von de la demando, profesoro Chester Chasterton proponis funkciigi la radio-aparaton kaj rifuĝi al la muziko kiel al freŝiga rimedo. Sed ankaŭ la muziko ne helpis. En la salono disportiĝis abrupte kaj gaje la sonoj de iu ŝas-bando. La sinjoroj profesoroj ridetis, forĵetis diablen la trovaĵon en Bolivio, mendis al si kelkajn botelojn da malpermesita trinkaĵo kaj komencis flustri al si tre amuze kaj refreŝige, kion la fremdaj oreloj ne devis aŭdi.

Certe, ĉiu povas imagi la turmenton de profesoro, kiu troviĝas antaŭ la nesolvebleco di iu scienca enigmo. Profesoro Chester Chasterton ne fermis la okulojn la tutan nokton kaj kiu scias — eble li estiĝus viktimo de la maldormo, se la venontan tagon la du bravaj usonanoj ne estus aperintaj en lia kabineto.

La unu el ili estis alta kaj malgrasa, kun vizaĝo, brunigita de la suno kaj kun piedoj, kurbigitaj arkforme, kio montris, ke profesoro Chester Chasterton havas la honoron vidi en sia domo veran kovbojon. La alia estis pli malalta kaj ruĝa kiel rapo, kun larĝaj makzeloj, kun verdaj elstarantaj okuloj kaj kun kurbaj oreloj formanĝitaj de muso.

La kovbojo antaŭenpaŝis kaj faris longan paroladon pri la fama trovaĵo en Bolivio. Li diris, ke li estis patrioto kaj ke li neniam permesus, ke onu lasu en la manoj de eŭropanoj trezorojn, elfositajn el la koro mem de la sankta amerika tero. Pro tiu-ĉi kaŭzo li kaj lia amiko faris ŝtelon en la nomo de la granda amo al sia patrujo kaj venis al la estimata sinjoro profesoro, kiun ĉiuj ŝtatoj honoras kiel diaĵon, por vidi, ĉu tio, kion ili malkovris ĉe la fosaĵo sudoriente de Kohalamba, prezentas vere ion eksterordinaran, kiel diris unu el la scienculoj de la ekspedicio. Fine la kovbojo sciigis, ke la elfosita trezoro troviĝis sube antaŭ la domo de sinjoro profesoro kaj ke ĝi tuj estas transportota en lian kabineton.

Profesoro Chester Chasterton staris kun larmantaj okuloj antaŭ siaj nekonataj gastoj kaj povis ekparoli ne eĉ vorton pro konfuziĝo kaj ĝojo. Li mem estis granda patrioto kaj la varma revelacio de tiu-ĉi simpla usonano, kiu havis sovaĝajn mo-

vojn kaj malĝentilan gorgĝan voĉon, lin kortsuŝis profunde.

La du nekonatoj elsaltis momente el la ĉambro, malsupreniris suben per la lifto kaj eliris sur la straton. Tie antaŭ la pordoj de la multetaĝa ŝtonkonstruaĵo estis vidata granda ligna kesto, kaj ĉirkaŭe kolektiĝis centoj da scivoluloj. Estis ankaŭ kelkaj fotografistoj kaj kinematografaj reĝisoroj, kiuj kuris emociite tien kaj reen kaj petis la publikon iiberigi la lokon antaŭ la objektivoj de iliaj aparatoj.

La kovbojo, lia amiko kaj ankoraŭ du tri fortuloj enigis la pezan ŝarĝon antaŭ la pordo kaj ĉar ĝi ne povis eniĝi en la lifton, tra la larĝa ŝtuparo tuj etendiĝis miloj da bobenoj kaj aliaj usonaj patentoj por ŝarĝeltiro. Por malpli de tri sekundoj la kesto estis levita kaj transportita en la kabineton de la profesoro.

Profesoro Chester Chasterton saltetis sur unu kruro kaj kantetis la nacian himnon. La du usonanoj ridis bonanime per larĝe malfermitaj buŝoj kaj iliaj grandaj dentoj brilis kiel fazeolaj grajnoj.

Kiam oni malnajligis la keston, profesoro Chester Chasterton kriis pro miro kaj ŝtoniĝis sur sia loko. Antaŭ li staris grandega griza ovo, kies perimetro laŭ larĝe ŝajnis esti pli ol du metroj.

Ankoraŭ la saman tagon la lifto levis en la kabineton de sinjoro profesoro ĉiujn New-Jorkajn famulojn en la fako de la naturscienco. Profesoro Chasterton senkulpigis sin konfuzite kaj sen ia-ajn kaŭzo antaŭ siaj gastoj, kiuj fakte malatentis sian faman kolegon. La du bravaj usonanoj, la kovbojo kaj lia amiko kun la larĝaj makzeloj, dronis kvazaŭ en la teron. Neniu jam vidis ilin ĉirkaŭe, ja, oni apenaŭ bezonus ilin.

Nun ĉiuj estis okupitaj per la mirinda ovo, pri kiu multaj opiniis, ke ĝi estis enterigita multajn jarcentojn en la tero. Oni foliumis ĉiajn librojn, dufoje pli dikajn ol la Biblio, oni ilin konsultis, oni elparolis latinajn nomojn. Kelkaj el la kolegoj de la sinjoro profesoro senvestiĝis, suprenfaldis la manikojn kaj komencis frapi la ovon per fingroj. Sed ĝia ŝelo estis fortika kiel ŝtono. Fine, post longaj esploroj kaj konferencoj, oni faris la ĝeneralan konkludon, ke la saĝaj maljunuloj havas la-

boron kun la ovo de malofta birdo de la ĝento de la strutoj, kiu loĝis antaŭ jarcentoj en Sudameriko kaj pri kiu la enciklopediaj vortaroj en la biblioteko de profesoro Chasterton donis tre malsufiĉajn informojn. Oni konstatis ankaŭ alian aferon, kiu estis pli grava: ke la embrio de tiu-ĉi ovo estas ankoraŭ vivanta kaj ke ĉe certaj favoraj kondiĉoj ĝi povas disvolviĝi kaj aperi al la blankan mondon\*) en la karno de tiu-ĉi malofta birdo, kiu estus vera nacia fierajo por la muzeo de New-Jorko. Tiamaniere gajnus la scienco kaj ankaŭ la Usono mem.

La blankbarbaj New-Jorkaj scienculoj korprenis la manon de sia kolego kaj deziris al li sukcecon en la nova laboro, aŭ per aliaj vortoj, benis la elkoviĝon de la ovo. Poste ili foriris, ĉar estis jam nokto. La nokto de la elektro, kiu bruligas la tutan ĉielon per reklamoj.

Profesoro Chester Chasterton mateniĝis super la grandega griza ovo kun ŝvelintaj okuloj, tute ensorbita de la penso por la antaŭstaranta laboro.

La venontan tagon li faris sciigojn en ĉiuj ĵurnaloj, ke li ŝiras ĉiujn ligojn kun siaj konatoj, dum li ne estos fininta la laboron, komisiitan al li. La ĵurnaloj uzis la okazon kaj komencis eldoni specialajn bultenojn por la marŝo de la granda scienca eksperimento. De sia flanko, la radio-telegrafaj stacioj en ĉiuj ŝtatoj sendis ĉiun minuton novaĵojn trans la oceanon. La tuta terglobo estis en ekscitiĝo.

Kaj profesoro Chester Chasterton ŝajnis freneza. Komence li pensis tutan semajnon, kiel komenci la laboron. Tio efikis tre malbone al lia sano kaj li komencis senti akrajn dolorojn en la posta parto de sia kapo. La venigita kuracisto rekomendis al li plenan ripozon de ĉiaj mensaj okupiĝoj. Kompreneble, profesoro Chester Chasterton plenumis tuj la konsilon de la kuracisto, ĉar finfine ili ambaŭ estis homoj de la scienco kaj oni devis estimi unu la alian. Li kuŝis tutan tagon en sia lito, trinkis teon, manĝis sian ŝatatan dolĉaĵon el bananoj, sed li ne ĉesis pripensi la ovon.

Kaj jen ĝuste nun la sporto venis por

helpi la sciencon. Foje, kiam sinjoro Chester Chasterton faris siajn ŝatatajn ekzercojn per la ferhalteroj, unu el ili elŝoviĝis el lia mano kaj falis sur la ovon. La ŝelo krevis, malfermiĝis kaj tra ĝi elstarigis kapon unu senpluma monstro kun longa beko kaj kun maldikaj kurbaj piedoj.

Per la natura flegmeco de la usonanoj profesoro Chester Chasterton proksimiĝis al sia labortablo, prenis la aŭdilon de telefono kaj sciigis en la klubon de la profesoroj la novaĵon pri la elŝeliĝo de la ovo.

En unu momento la tuta Usono alarmiĝis. Mil popolamasoj ekiris per ĝojaj krioj al la granda domo, en kiu loĝis la profesoro kaj la polico devis uzi bronitajn aŭtomobilojn por gardi la ordon tra la stratoj.

De tiu-ĉi tago profesoro Chester Chasterton estis la plej malfeliĉa homo sur la tero. De la mateno ĝis la vespero al li venis miloj da raportistoj, fotografistoj, direktoroj de filmentreprenoj. Ĉiuj demandis lin, proponis al li monon, fotografis lin en plej diversaj pozoj. La maljuna servisto Jack elverŝis ĉiun matenon en la kabineton de sia mastro po tri grandajn korbojn da leteroj, kiuj venis el ĉiuj flankoj de la beata usona lando. Unu proponis al sinjoro profesoro kvin mil dolarojn por engravuri lian nomon antaŭ la pordo de ia restorejo, alia petis permeson de li meti en siaj reklamoj por sapo lian aŭtografon.

Chester Chasterton. Tiu-ĉi nomo tonbris tra tuta Ameriko. En la kinematografetoj, tra la reklamoj, en la hoteloj, en la fabrikoj, tra la vitraĵoj, sur la naztukoj, sur la ŝuoj, sur la ĉapeloj, eĉ sur la dentpurigiloj oni povis legi per malgrandaj nigraj literoj: Chester Chasterton.

Ĉiuvespere la fama scienculo devis ĉeesti diversajn bankedojn, aranĝitajn en lia honoro. Bankedo de la profesoroj, bankedo de la instruistoj, bankedo de la purigistoj de kamentuboj, bankedo de la fraŭloj, bankedo de la viroj kun kalvaj kapoj ktp.

Kaj se iu ternis ie, oni aŭdis kiel toston: „Chasterton!“

Fine, kiam venis delegacio el kvindek

\*) Bulgarismo: naskiĝi. Trad.

personoj kaj sciigis al la maljuna scienculo, ke en City estas metita la bazŝtono de lia monumento, kiu estus altiĝonta mil metrojn, t. e. multe pli alta ol la turo de Eifel de la francoj, profesoro Chester Chasterton ne povis elteni la ekscitiĝon kaj mortis pro korkrevo, kvankam li estis, kiel mi diris ankoraŭ en la komenco de mia rakonto, eksterordinare sana homo.

Kelkajn jarojn pli malfrue la granda eldonejo Ritings Smikings & Co en New-Jorko eldonis belegan enciklopedion en tridekses volumoj kun koloritaj ilustraĵoj kaj kun bindaĵo el negra ledo — lasta vorto de la usona grafikarto kaj prestekniko. En la dekkvara volumo de tiu-ĉi enci-

klopedio, ekde paĝo trimilsepcentkvardek-dua ĝis paĝo kvarmiltricensesdeka estas publikita detale la biografio de la mortinta profesoro Chester Chasterton kune kun kelkaj dekoj de liaj fotoj. Por informiĝi, la leganto povas servi al si per la dirita enciklopedio, kie estas montrita samtiel ankaŭ tiu-ĉi detalaĵo, ke la senpluma monstro elsaltis el la ovo kun malgranda tabeleta ĉirkaŭ sia kolo. Tie estis skribite:

Made in  
U. S. A.

El bulgara lingvo tradukis  
G. H.

## La fremduloj por nia 26-a bulgara esperanto-kongreso

La 26-a kongreso de bulgaraj esperantistoj okazis 26—29-a de aŭgusto 1939 j.

Dimanĉon la 27-an de aŭgusto Pleven estis plenplena de esperantistoj, kiuj donis al tiu granda bulgara urbo sian specialan koloron. Antaŭtagmeze kolektiĝis en salono Sâglasie dum solena malfermo de la kongreso ĉirkaŭ 400 esperantistoj kaj reprezentantoj de diversaj lokaj societoj. Sufiĉe multnombra grupo el Jugoslavio (d-ro Jovanoviĉ, inĝ. Godek, ges-anoj Štefanoviĉ, Markoviĉ kaj Zvonko Redoŝeviĉ) estis objekto de speciala atento kaj de frataj manifestacioj, kiujn aranĝis la bulgaraj samideanoj al nialanda movado kaj al nia lando. La salono plenplena de esperantistoj prezentis vere maloftan bildon kaj la malferma kunsido estis vere impona manifestacio de la forta bulgara esperantista movado. Specialan atenton oni dediĉis al paroladoj de s-anoj Stefan Radev kaj Ksenofon Jankov kiel ankaŭ al reprezentanto de la registaro d-ro Matrov. La Esperantlingvaj paroladoj de ambaŭ jugoslavaj delegitoj ricevis fortegan aplaŭdon kaj elvokis sinceran fratan manifestacion por nia lando kaj por pli intensa kunlaborado de niaj movadoj.

Posttagmeze ni havis okazon trarigardi la urbon Pleven, kiu estas vere interesa. Speciale interesaj estas multaj restaĵoj kaj monumentoj de la liberiga milito kontraŭ la turkoj. Tiuj restaĵoj kaj monumentoj

donas plej karakterizan trajton al Pleven „Jerusalemo de la bulgara libereco“. Samtempe ni havis okazon interkonatiĝi kun multaj samideanoj kaj priparoli kun ili multajn aktualaĵojn.

Vespere estis aranĝita arta kaj literatura programo kaj post ĝi dancvespero. Ĉiuj punktoj de la programo estis bonege aranĝitaj de diversaj esperantistaj grupoj kaj la salono plena ĝis la lasta loko multfoje tondre aplaŭdis al prezentantoj. Speciale estis kontentaj ni el Jugoslavio, ĉar tiamaniere ni havis la okazon aŭskulti kelkajn recitaĵojn kaj kantojn en bela bulgara lingvo, al kiu niaj oreloj baldaŭ al kutimiĝis.

Post la kongreso la jugoslavia grupo faris rondvojaĝon tra Bulgarujo kaj vizitis urbojn Varna, Tirnovo, Plovdiv kaj Sofia. Tie ni trapasis kelkajn belajn tagojn rigardante unu vere belan landon kaj ekkoninte bravan popolon. Ĉie ni trovis multajn gesamideanojn kiuj ebligis al ni ne nur vere agrablan restadon, sed ankaŭ ili helpis al ni studi la landon kaj popolon. Dum interparolado kun bulgaraj samideanoj firmiĝis nia konvinko, ke ni esperantistoj devas ankaŭ ekagi ne nur por pli intensigi la kunlaboradon de ambaŭ esperantistaj movadoj: bulgara kaj jugoslavia, sed ankaŭ por prepari fratan kunlaboradon de ĉiuj sudslavaj popoloj.

*Inĝ. Ivo Godek*

El „La suda stelo“, jugoslava esperanto-revuo

## La 26-a kongreso de Bulgara esperanto asocio en Pleven

Je la 27 kaj 28 de aŭgusto 1939 j. en la historia urbo *Pleven* okazis la 26-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj.

La solena malfermo de la kongreso okazis en la granda salono de la urba legejo „Säglasie“ kun gratulpalorado de l'prezidanto de Plevena esperantista societo „Esperanto“ s. G. Cvetanov. Je la nomo de la Centra komitato de Bulgara esperanto asocio parolis la sekretario de la asocio s. Em. Stratev, kiu diris, ke la bulgaraj geesperantistoj devas labori „per esperanto por Bulgario“.

Por honora prezidanto de la kongreso oni elektis la plej malnovan esperantiston en Bulgario s. N. Gaŝevski el urbo Bela Slatina kaj por sekretario s. Georgi Dimov el Varna. La lasta proponis kaj la kongreso elektis per aplaŭdoj jenan kongresgvidadon:

Prezidanto—*Ksenofon Jankov*—Varna; vicprezidantoj: *D-ro Panajot Hitrov* — Svoĝe; *Georgi Cvetanov* — Pleven; honoraj vicprezidantoj: *D-ro Vuk Jovanoviĉ* — Karlovac, Jugoslavio; inĝeniero *Godek* el Zagreb, Jugoslavio; sekretarioj: *Georgi Dimov* — Varna; *Simeon St. Hesapĉiev* — Sevlievo; *Ljuben A. Dunĉev* — Pleven.

Oni elektis ankaŭ komisionojn por la rajtigiloj, por la budĝeto, por la rezolucioj kaj por la ŝanĝo de la statuto.

La prezidanto de la kongreso s. Ks. Jankov en sia parolado diris, ke la bulgaraj esperantistoj estas bonaj bulgaroj, kiuj per ĉiuj siaj fortoj laboras por konatigi sian landon — ĝian belecon kaj popolon—al la fremduloj. Je la fino de sia parolado li petis la kongresanojn doni lastan honorigon per leviĝo je la memoro de la mortigitaj 26 niaj fratoj en vilaĝo Belica (Dobruĝa) nur pro tio ke ili estas bulgaroj.

La kongreso sendis gratulotelegramon al L. M. reĝo Boris III per leviĝo, kanto de la reĝa himno kaj per forta krio „Hura!“

La kongreso estis gratulita je la nomo de la registaro de s-o D-ro Matrov. Je la nomo de Jugoslavio parolis s. D-ro Vuk Jovanoviĉ kaj inĝ. Godek. Parolis an-

kaŭ reprezentantoj de multaj kulturkleriĝaj organizaĵoj. Estis ricevitaj multaj saluttelegramoj.

Post la solena malfermo de la kongreso komencis la laborkunsidoj en la salono de la populara banko (8 h. matene, 28. VIII).

La tagordo de la kongreso estis jena:

1. Raporto de la Centra komitato kaj kontrolo komisiono.
2. Diskutado por la raportoj.
3. Liberigo je respondeco al la gvidantaro.
4. Ŝanĝo de la statuto.
5. Estonta agado.
6. Diversaĵoj.
7. Elekto de nova Centra komitato kaj kontrolo komisiono.

Raporto por la agado de la Centra komitato faris la sekretario de la asocio s. Emil Stratev. Dum la jaro plej agema estis la societo en Varna. En Bulgario ekzistas 28 esperantistaj societoj kun 342 membroj. Kun la Jugoslava esperantista asocio ni estas en bonaj rilatoj.

S-ro Oktomvrijski tralegis la raporton de la kontrolo komisiono. En la debatoj partoprenis multaj samideanoj.

La kongreso faris kelkajn tre gravajn ŝanĝojn en la statuto de la asocio.

Por la estonta agado de la asocio oni rekomendis jenajn iniciatojn: malfermo de esperanto kursoj, radioparoladoj, esperantistaj renkontoj kaj konferencoj, bonaj interrilatoj kun la frataj sudslavaj gesamideanoj, ŝanĝo de „Bulgara esperantisto“ kun fremdlandaj redakcioj, kiel estas organizita kun „Suda stelo“ k. a.

Estis voĉdonita kaj akceptita la budĝeto por 1940 j. Oni decidis la 27-a kongreso okazi en urbo Loveĉ.

Por la nova Centra komitato estis elektitaj jenaj samideanoj: At. D. Atanasov, D-ro Zah. Zahariev, Stefan Ganĉev, Belĉo T. Oktomvrijski, Ivan Kotov, Stefan Jonĉev, Ivan Sarafov. Por kontrolo komisiono: Bogdana Popova, Georgi Härŝev kaj Bojĉo Gerginov.

Post tio la kongreso estis fermita. Ĝi faris ĉion eblan solvi la demandojn

por la bona estonteco de nia movado. Tagmeze ĉiuj gekongresanoj estis je la stacidomo, kie la fratoj—jugoslavo—preparis sin ekveturi kaj ekskursi tra nia lando. La adiaŭo estis kortuŝa. Ĉiuj ekkantis „Hej slavo!“, „Ni estas gefratoj de tuta la mond’“. Oni aŭdis la ĥorajn ekkriojn: Vivu Bulgario! Vivu Jugoslavio! Vivu esperanto!

Post la kongreso oni faris du ekskursojn: al la ŝtata farmejo Klementina kaj al la bela loko Kajlaka.

La kongreso finis. Ni ĉiuj promesis labori senĉese por la bono de nia asocio, por kompreniĝo inter la popoloj, por la granda prospero de esperanto en nia lando.

S.

## Esperanto-ekzameno

Post nia 26-a kongreso en Pleven dum aŭgusto, grava por nia movado okazintaĵo estis la 1-a Esperanto-ekzameno en Sofia dum oktobro. Ĝi okazis je la 25-a kaj 27-a de l'sama monato ĉe la III Sofia knaba gimnazio, *vice kun la ceteraj oficialaj „prikonstatataj“ ekzamenoj* pri latina greka, franca kaj germana lingvoj.

Malgraŭ unu embaraso pro malgranda miskompreno tiu ĉi nia 1-a oficiala E.

konduktis al la afero. Ili duope meritas nian altan estimon.

Kuraĝe ni povas diri, ke s-ro Arakĉiev restas por nia afero ne kiel kontraŭulo, sed kiel potenca favorulo, laŭ la modelo de l' multaj vivantaj kaj mortintaj tutmondaj eminentuloj, kiel: la iamaj liceaj kaj universitataj profesoroj — Boirac, Bourlet, Cart, Javal, Rousseau, H. Dor, P. Kadik, Lederer, Mayor, Villareal k. a. kaj la nu-



S-ro Ivan Arakĉiev,  
dir koro de III knaba gimnazio en Sofia.

ekzameno okazis sukcese, nome dank'al la sinjor-direktoro de la gimnazio, s-ro Ivan Arakĉiev, kiu estas estiminda bonulo kaj favore helpis nian aferon. Ekzamena membro pri Esperanto estis oficigita de la Ministerio de popola instruado nia bone konata samideano, s-ro Ivan Sarafov, kiu dankinde serioze



Samideano Ivan Sarafov,  
membro de C. K. de B. E. A.

naj tiaj, — Odo Bujwid, Inglada, Kamarit, Rakuŝa, Kenngott, Won Renn k. a. Nia landa movado bezonas tiajn personojn kaj devas ilin serĉi kaj trovi ĉiam kaj ĉie. Eminente signifa estas la fakto, ke nian 1-an E.-ekzamenon ĉefis ne iu alia, sed la bonulo — gimnazia profesoro.

Eminente signifa estas ankaŭ la fakto



ke antaŭ la ĉitiusesia ekzamena komisiono ekstaris nur du ekzamenotoj, ke tiu ĉi duopo prezentis du apartajn E.-generaciojn, feliĉe kunligitajn en unu sama spirito, kaj ke ĝi devenas de Varna, la historie kvara E.-nesto en nia lando (post Tirnovo, Sofia kaj Plovdiv). Tute ne malgrava estas la fakto, ke Esperanto-instruistino kaj ŝia Esperanto-instruisto konkuris egalforte kaj egalsukcese pri siaj konoj de la lingvo, de la Esperanto-movada historio, de l'Esperanto-leraturo kaj de l'nuntempa instruometodo (la „direkta“).

S-ino Zora Mlad.-Hans — iama popola instruistino kaj nuna ĉegimnazia kandidat-instruistino pri pedagogio kaj bulgara lingvo — prezentas per sia griza hararo la pasintan tempon. Infektita de Esperanto-bacilo en 1908, kunhelpinta E.-redakcion en 1912 kaj aliĝinta al Esperanto-movado en 1921, ŝi gvidadis E.-kursojn dum la jaroj 1922—1925 en Varna kaj kreis dekon da fervoraj niaj pioniroj. Ŝi instruis la lingvon laŭ la gramatik-metodaj lernolibroj de Panajot Kolev k. a. kaj de Ada.

S-ro Georgo Ĥr. Dimov, nuna komerc-

lerneja instruisto, — Esperanto-instruisto de s-ino Zora Nans ekde 1923 kaj organizita fervora esperantisto ekde 1926, — estas nun prezidanto de l'societo „Albatro“ en Varna kaj per sia vigla temperamento prezentas la modernan tempon, kiel nura Ĉe-instruisto en nia lando ekde 1936 jaro. Laŭ tiu ĉi moderna „direkta“ metodo de pastro Andreo Cseh li gvidis kaj gvidos multajn E.-kursojn, el kiuj ĝis nun naskiĝis esperigaj gefervoruloj (en Sofia kaj Varna), aktive agantaj por nia enlanda movado.

Ni esperas, ke antaŭ la sekvantsesia Esperanto-ekzamena komisiono sin prezentos pli multe da kandidatoj por instruistoj de Esperanto, unuj el kiuj komencos sperte gvidi publikajn kursojn kaj restos pretaj atendi la enkondukon de nia lingvo en la lernejojn por ĝin donadi al la plej junaj patrujaj generacioj.

Al niaj nunaj du altsukcesintaj ekzamenitoj ni kore gratulas la oficialigitan „kapablecrajton“ kaj dankas pri iliaj modelaj memdisciplinaj fervoreco kaj sindonemo al Esperanto-movado.

Ni sekvu la ekzemplon de Varna!

ZORA MLAD.-HANS

## KONFESO POR DANKO

(Rememoroj)

Estis aŭgusto en 1908 jaro. Ĉe la fino de bulgara vilaĝeto Orta-kjoj, du kilometrojn apud fervojstacio Levski, troviĝis simpla bieneto de la vilaĝeta popola instruisto. La legomflora ĝardeno antaŭ la bieneta domo estis ankoraŭ sufiĉe freŝa kaj abunde diverskolora — ruĝadis la tomatoj inter la verdaĵo kaj bonodoris la diversfloraj bedoj, moderne planigitaj inter puraj sablaj vojetoj.

La familio, konsistanta el geedzoj kaj tri infanoj, sidis sur tutherba bedo apud la alta ligna plektobarilo. Proksimiĝis la sunsubiro kaj en la aero portiĝis sonoj de ŝafsonoriloj kaj aromoj de la floroj. Ĉe la familio estis ankaŭ gasto — la mastrina kuzo, popola instruisto en proksima vilaĝo, kiu ankoraŭ ne rapidis forveturi al

sia lernejsidejo, tial ke ĝis la komenco de la lernojaro restadis ankoraŭ deko da tagoj.

La dommastro, kiu dum la somera ferio estis fluganta birdo en vesto de ĵurnalisto, partiano, diversflanka sociulo kaj gazetredaktoro, tiun tagon matene revenis post sia migrado inter Sviŝtov, Pleven, Loveĉ, Tirnovo kaj Ŝumen. Nun li raportadis pri io tute mistera.

— Estis entuziasmo, gaja amuzo, fratinterkompreno. Mi speciale aktive ŝercadis kaj miaj gastoj, la rumanoj, perfekte min komprenadis. Fine ili restis kontentaj pri ĉio, kion ili travivis ĉe ni. Inter ili estis familioj. Unu infaneto deklamis kaj ni ĉiuj bone ĝin komprenis. Tio ĉi okazis ĉe la solena bankedo en „Kjoŝkovete“. Neforgesebla kongreso ĝi estis! . . .

Kia kongreso ĝi estis do? Kongreso de bulgaroj kaj rumanoj, adeptoj de ia nova tutmonda lingvo „Esperanto“? Ĉu efektive ekzistas tia lingvo, kreita de iu doktoro Zamenhof el ia malproksima lando? Ĉu ne mensoga estas tio, ke infaneto deklamis ion en tiu sama lingvo kaj ĉiuj ceteraj bone komprenis tiesan deklamon? . . . Kiom strange kontenta kaj vervigita aspektas la patro, kiu tiel klare kaj komprenas parolas pri mondlingva ideo, homaranismo, Esperanto, esperantistaro!..

Sendube, la homaro devas esti frataro kaj la tutmonda lingvo — facila, komprenebla, helpa kaj fratiga rimedo inter la homoj de ĉiuj nacioj, rasoj kaj religioj! Ho, majesta grandega homaranisma ideo kaj simpatia alloga D-ro Zamenhofa lingvo! . . .

Unu malgrandeta koro de infano estis profunde emociigita kaj entute forrabita de tiu Esperanto-ideo. Depost tiu ĉi antaŭvespera momento en tiu aŭgusta tago la malgrandeta koro — de knabineto kun plej kompatinda figureto de flav-nigretvizaĝa kaj ĉiam malari-febranta estaĵo-ekpulsadis en unu sama takto kun la homaranisma mondlingvo. Sorĉa mirakla Esperanto! . . .

— Zonjo! Kie vi lasis la pantranĉilon? Vi nemiam ĝin metas sur ĝian decan lokon, — post ia momento alflugis el la domo la patrino voĉo.

— Mi ne scias, ne memoras, — negliĝe respondas la knabineto kun la malaria etstatura aspekto kaj daŭrigas sinforĝese aŭskultadi la patran parolon pri la mistera novaĵo. Zonjo travivadis nun duan bapton — la bapton de sia spirito, kaj sentis klare, ke ŝi mem per siaj propraj manoj mem eltiras el la brusto sian varman koreton kaj ĝin metas en la altaron de la Esperanto-templo.

Ŝi ĉiam forgesadis kien meti kaj kien ŝi metadis la pantranĉilon, sed por ĉiam ekmemoris, ke sian koron ŝi metis nome en tiun altaron.

Dum la printempo del'jaro 1912. en la Balkana vilaĝo Karaŝ — apud la rivereto Malki Iskâr, inter pitoreskaj montaj ĉirkaŭaĵoj kun arbaroj, herbejoj, rokoj kaj valoj — tiu sama sensignifa nerimar-

kinda gnoma figureto estis jam iom pli belaspekta kaj iom pli altstatura kandidat-gimnaziano kaj interalie lernis Esperanton. Post sia ekzameno de privata unuaklasa gimnaziano en Tirnovo, dum junio en la sama jaro, ŝi akcele pliperfektigadis en tiu lingvo, kiel ĉefa ekspedantino de la bulgara esperantista revuo „Lumo“, kiu post sia 4-a numero ĉesis aperi.

La Balkana milito mobilizis ankaŭ ĝiajn du redaktorojn, unu el kiuj baldaŭ fordonis al la morto kaj la ceteran — la patron de Zonjo — por ĉiam deflankigis de la Esperanto-movado. Kun Esperanto restis nur Zonjo kaj ŝia koro. — Ĝis la fino de sia gimnazia studado ofte ŝi notis sekretojn en sian intiman kajeron nome en tiu ĉi lingvo, ne tute perfekte posedata de ŝi, kaj disiĝis kun la knabina gimnazio de Varna, decidinta esti kaj dum sia tuta vivo resti nur simpla popola instruistino. De nun ankaŭ ŝi flankeniĝis de Esperanto — nur de tempo al tempo ŝi sentadis subkonscie aŭ rememoradis klare, ke ŝia koro estas en la templo de la Esperanto-homaranismo. Kaj nur tiom, ĝis unu pli posta aŭtuna tago! . . .

Nome tiun ĉi tagon, dum septembro 1921, ŝi vizitis unuafoje la ĉiumardan vesperan renkonton de la esperantistoj en Varna, tuj senhezite estiĝis membro de la tiama Esperantista grupo „Frateco“ — pli poste transformigita en societon „Albatro“ — kaj restis ĝis nun jam organizita konscia esperantistino.

Nun la voĉo patrino mankas — la morto ĝin anstataŭis per muta tombo. La patrino ripozas en la tombejo de Sofia. La patro vivas kaj zorgas nur por sia domo en Varna. Sed la pantranĉilo ankoraŭ ne havas sian difinitan lokon, ĉar nun la filino de Zonjo mem ne scias kaj ne memoras kien ĝin ŝi metas. Tamen, tiu ĉi iama Zonjo jam bone memoras kaj klopodas memori, ke ŝi retrovis sian koron kaj restis nedisigeble kun ĝi por pensi, zorgi kaj agi laŭpove pri kaj por Esperanto.

Je la 27-a de oktobro 1939, en Sofia, dank'al la estraro de Bulg. Esper. Asocio, ne kiel Zonjo kun la malariflava vizaĝo, sed kiel Zora kun griza hararo, ŝi ekstaris antaŭ oficiala eksameno pri Esperanto

kaj eksentis sin pli firma esperantistino, ricevinte „kapablecraĵtan“ ateston pri kono kaj posedo de Esperanto kaj travivinte gravan dankecon al B. E. A. kaj majestatan intiman ĵuron al Esperanto — labo-

ri por ĝi senlace ĝis sia morto mem. Nun pro B. E. A. la grizulino Zora baptis sin trian fojon, por resti pluen nur kiel pli sindona vera „ortodoksa“ esperantistino. — Dio ŝin helpu! . .

## Български есперантски съюзъ

Управителенъ съветъ

№ 3

10. януарий 1940. год.

София

## ОКРЪЖНО

### До есперантскитѣ дружества въ България и отдѣлнитѣ есперантисти

Управителниятъ съветъ на Българския есперантски съюзъ честити новата 1940. год. на всички съидейници въ страната, пожелавайки имъ все така енергично да работятъ за успѣха на есперанто и презъ настоящата година. Сжщевременно имъ съобщава радостната вестъ, че уставътъ на Съюза е вече утвърденъ съ заповѣдь № 4271 отъ 19. декемврий м. г. на г. Министра на вжтрешнитѣ работи и народното здраве.

Утвърдени сж и уставитѣ на следнитѣ мѣстни есперантски д-ва: „La Verda karavano“ — с. Столътъ, ок. Севлиевска, „La Roza valo“ — Казанлъкъ, „Solidareco“ — Русе, „Espero“ — Сливенъ, „Esperanto“ — Плѣвенъ, „Lumo“ — Търново, „Radio“ — Пазарджикъ, „Signo de l'espero“ — Асеновградъ, „Kulturo“ — Пловдивъ, „Flamo“ — Кюстендилъ, „Albatro“ — Варна, „Stelo“ — Кърджали, „Mondamikeco“ — Чирпанъ, „D-ro Esperanto“ — Пещера и Есперантското д-во — София.

Като отбелязва тоя фактъ, Управителниятъ съветъ констатирва, че следъ конгреса не е проявена никаква дейность, както отъ самия него, така и отъ мѣстнитѣ дружества, съ изключение на едно или две. Причинитѣ за това се криятъ въ политическитѣ събития въ свѣта, които въобще не представляватъ добри условия за културно-просвѣтни инициативи, а въ голѣма степенъ сжщо и неустановеното положение на Съюза и дружествата, докато уставитѣ имъ не бѣха утвърдени. Сега, следъ като тая формална спънка е премахната, дългъ ни се налага да стегнемъ организацията си и да дадемъ максимумъ усилия, за да проявимъ възможната при днешнитѣ условия дейность.

Затова Управителниятъ съветъ нарежда:

1. Всѣко дружество да съобщи въ Съюза № на заповѣдта, съ която е утвърденъ уставътъ му.
2. Ония дружества, на които още не сж утвърдени уставитѣ имъ, да съобщятъ направили ли сж постѣпки предъ надлежнитѣ власти за утвърдението на уставитѣ имъ и кога.
3. Всѣко дружество, което има вече утвърденъ уставъ, да си избере ново настоятелство и съобщи въ Съюза за състава му.
4. Всички дружества да пристѣпятъ къмъ енергично събиране чл. вносъ и абонамента на списанието, за да се осигури редовното му издаване. Съгласно конгресното решение въ Плѣвенъ, членскитѣ вносъ и абонаментътъ си оставатъ сжщитѣ (20 лв. чл. вносъ и 20 лв. абонаментъ).
5. Отдѣлнитѣ есперантисти, тамъ гдето нѣма есперантско дружество, могатъ да членуватъ направо въ Съюза, като си изплатятъ чл. вносъ отъ 20 лева.
6. Всичко, което се отнася до Съюза, да се адресира: Български есперантски съюзъ — 50, ул. Алабинъ — София. Суми да се превеждатъ чрезъ пощенската чекова смѣтка на Съюза № 1133 или да се изпращатъ чрезъ чисти пощенски или гербови марки.

7. За да улеснимъ ония наши съидейници, които искатъ да образуватъ есперантско дружество въ своето населено мѣсто, а не знаятъ какъ да сторятъ това, даваме следнитѣ упътвания:

Въ селища, кждето има поне 6 души есперантисти, могатъ да се образуватъ есперантски дружества. За целъта се постъпва така:

Свиква се събрание отъ инициатора и се съставя учредителенъ протоколъ за образването на дружеството, като се приема и уставътъ му. Избира се настоятелство. За малкитѣ дружества достатъчно е настоятелство отъ председателъ, секретаръ-касиеръ и единъ или двама съветници. Избира се контролна комисия отъ трима души. Приетиятъ уставъ се съставя въ два еднообразни екземпляра, подписани отъ членоветѣ на настоятелството. Подава се заявление за утвърждаване на устава отъ настоятелството на дружеството до съответния областенъ директоръ, който го препраща въ Министерството на вътрешнитѣ работи и народното здраве.

Къмъ заявлението се прилагатъ следнитѣ книжа:

учредителниятъ протоколъ;

два броя отъ приетия уставъ;

списъкъ на членоветѣ-учредители;

списъкъ на членоветѣ отъ настоятелството и контролната комисия, съ означение точнитѣ имъ три имена, длъжността, която заематъ въ настоятелството, занятието и адреситѣ имъ.

Заявлението се облепва съ сто лева марка за обществено подпомагане. Тази марка се набавя отъ клоноветѣ и агентуритѣ на Българска народна банка.

Утвърждаването става съ заповѣдь, обнародвана въ „Държавенъ вестникъ“.

Умоляватъ се съидейниците за всѣка подобна инициатива да уведомяватъ Съюза.

Типовъ уставъ се изпраща отъ Съюза при поискване.

Съ есперантски поздравъ,

Председателъ: **Ат. Д. Атанасовъ**

Секретаръ: **Бѣлчо Т. Октомврийски**

## Къмъ библиографията на българската есперантска литература

Нашиятъ съидейникъ **Емилъ Стратевъ** работи върху библиографията на българската есперантска литература. Тя ще обхваща следнитѣ части:

1. Книги на есперанто
2. Книги за есперанто
3. Учебници, речници и др. учебни помагала
4. Вестници и списания
5. Разни.

Първата часть отъ тази библиография е готова и е отпечатана като притурка къмъ Албума на българскитѣ есперантисти — издание на „СПИКТУР“ — София.

За да се улесни изработването на останалитѣ части, умоляватъ се всички съидейници, които иматъ отъ горнитѣ видове печатни издания, да изпратятъ по единъ екземпляръ отъ тѣхъ на адресъ: „СПИКУР“ международенъ институтъ — 50, Алабинъ — София.

Следъ използването имъ, екземпляритѣ ще имъ се върнатъ обратно.

## Важно съобщение

Настоящият брой 1. се изирача на всички миналогодишни абонати.

Умоляват се съидейницигъ, които не желаятъ да го получаватъ, да го върнатъ. За целта да отбележатъ върху броя „обратно въ редакцията“ и да го пустнатъ въ коя да е пощенска кутия.

Всѣки, който задържи този брой, се счита абонатъ и се умолява въ най-скоро време да внесе абонамента отъ 20 лв. по пощ. чекова с-ка 1133 или да изпрати сумата въ неупотрѣбени пощенски или гербови марки.

Редакцията е увѣрена, че никой не ще откаже да внесе тази малка сума.

Обемътъ на съюзния органъ и тази година ще бжде двоенъ — по 16 страници всѣки месецъ, — а администрацията му е реорганизирана съ огледъ всѣкой абонатъ редовно и на време да го получава.

Излѣзе отъ печатъ многоочакваниятъ

### „АЛБУМЪ И АДРЕСНИКЪ НА БЪЛГ. ЕСПЕРАНТИСТИ“

Албумътъ е отпечатанъ съ двуцвѣтенъ печатъ и художествено изработени корици и е едно истинско есперантско украшение. Цененъ подаръкъ не само за българскитѣ, но и за чуждестраннитѣ есперантисти, защото последнитѣ ще иматъ възможността и удоволствието да се опознаятъ съ българскитѣ си съидейници, а така сжщо — и съ България. Форматътъ на албума е 15.5 на 23.5 см. съ 146 страници.

#### АЛБУМЪТЪ СЪДЪРЖА:

1. Antaŭparolo de Ada.
2. Geografia skizo pri Bulgarujo.
3. Bulgarujo tra la jarcentoj.
4. Bulgarujo — lando de turismo kaj kuracakvoj de Iv. Sarafov.
5. La esperanto-movado en Bulgarujo de At. D. Atanasov.
6. Портретитѣ на повече отъ 400 есперантисти отъ всички краища на страната ни съ адреситѣ имъ.
7. 25 изгледи отъ разни градове и снимки отъ есп. конгреси.
8. Карта на Балканския полуостровъ на есперанто.
9. Bibliografio de bulgara esperanto-literaturo de Emil Stratev.
10. Азбученъ указателъ на всички селища, които сж представени въ албума.

#### ЦЕНА 50 ЛЕВА.

Поржчки при „Спиктур“, международенъ институтъ — 50, ул. Алабинъ — София.

Суми се превеждатъ чрезъ пощ. чек. с/ка № 3616 или чрезъ пощ. или герб. марки

# KRONIKO

## Funebra sciigo

La kruela morto forrabis el niaj vicoj la piloton-aviadiston Aleksandr At. Ĉirpanliev el vilaĝo Ŝipka, Kazanlâŝko. Li



estis bona kaj sindona esperantisto, brava bulgara oficiro, kiu restis ĝis sia morto fidela je sia posteno. La lando perdis unu heroon, la esperanto movado unu senlacan samideanon.

### *In memoriam*

Nia kara samideanino Marta Rut, kiun ni dufoje havis la feliĉon aŭdi en Sofia, ne plu estas inter la vivantaj.

Marta Rut estas naskita en Riĉvud, Ŝio, la 10-an de Aŭgusto 1872. Kaj ŝia surtera vojo ĉesis je la 28-an de septembro 1939 kiel gastino de s-ino Katrin Baldevin en Honolulu.

F-ino Marta Rut kiel heroino traveturis la tutan mondon kaj en pli ol 400 universitatoj faris paroladojn en esperanto pri la nova internacia movado — la bahaismo, pri kunfratiĝo, paco kaj amo. Ŝi estis akceptita de reĝoj, reĝinoj, princoj, prezidantoj, ŝtatgvidantoj kaj verkistoj en Oriento kaj Okcidento. Ŝiaj samideanoj, kiuj pli bone konis ŝin, taksas ŝin kiel anĝelon, puran kaj bonan, plenan de ener-

gio kaj neordinare inteligentan; la bonaĵoj faritaj de ŝi estas netakseblaj.

M. R. multe parolis kaj skribis pri paco kaj interpopola amikiĝo, sed bedaŭrinde forlasis la surteran vivon ne havinte la eblon vidi la realiĝon de siaj revoj.

**Sofia.** La 6—an de decembro la Sofia societo havis sian jarkunvenon. Elektita nova estraro: prezidanto — Stefan Ganĉev, vicprezidanto — Stefan Jonĉev, sekretario — Kiril Draĵev, kasisto — f-ino Bogdana Popova kaj bibliotekisto — Svi-  
len Sokolov.

La 13—an de decembro la societo festis la 80—jaran datrevenon de la naskiĝtago de nia Majstro. Per kelkaj konvenaj vortoj la prezidanto s-ro Ganĉev malfermis la feston. La sekretario s-ro K. Draĵev tralegis la leteron de D-ro Zamenhof, adresitan al la rusa esperantisto Borovko. Sekvis bone aranĝita programo: la blindaj samideaninoj Elena Stoiĉkova, Vetka Nikolova, Tanja Ruseva kaj Genka Nikolova plenumis solo—kaj dueto-kantojn de Schubert, Grieg k. a. kaj deklamaĵojn de Zamenhof, Botjov kaj Warma Tilander. S-roj Iv. Iliev kaj P. Kamburov ludis popolajn melodiojn per ŝalmo.

La vesperfesto estis amase vizitita.

En belaspekta domo, refarbigita kaj dekore ornamita, okazas regule la ĉiunmerkredaj kunvenoj, vizitataj multnombre. Ilia programo estas tre varia, precipe dank'al la kreita „ĵurnalo parolata“, en kiu kunlaboras la plimulto de la membroj.

La komunaj vespermanĝoj de la esperantistoj-intelektuloj okazas la lastan merkredon de ĉiu monato en la restoracio Slavjanska beseda. En bonhumora atmosfero auskultante la neelĉerpeblajn

La ĉiutaga ĵurnalo „Zarja“ aperigas ĉiusabate kolonon por kaj pri esperanto kun sciigoj, novaĵoj ktp. Sendu interesan materialon!

Adreso: B. Golemanov, ĵurnalo „Zarja“ str. Dondukov, № 84, Sofia, Bulgario.

ŝercojn de Ada, Milenkov, Ganĉev, Krestanov kaj aliaj, la du horoj forflugas kiel du minutoj!

En la domo funkcias esp.-kurso por komencantoj. Kursgvidanto s-ro Em. Stratev. Partoprenantoj 30 personoj.

**Samokov.** Je la 9. decembro en la loka geknaba gimnazio sub la prezido de la direktoro mem s-ro Jankov nia samideano Ivan Krestanov paroladis pri „Esperanto kiel faktoro de klerigo“. La sama en siaj paroladoj pri la Baltikaj ŝtatoj kaj pri la nordaj landoj en la salonego de la loka legejo menciis la utilon de esperanto dum liaj vojaĝoj.

**Pazargik.** La esperanto societo „Radio“ havis sian jarkunvenon je la 7-a de decembro. Estis elektita nova konsilantaro: prezidanto — Vasil D. Lazarov, poŝtkasisto, sekr. kasisto — Sotir K. Vasilev, ŝtonĉizisto, dom.-bibliotekisto d-ro Ĵak M. Behar, dentisto.

Kontrola komisiono: Atanas Furnaĝiev, kasisto de Bulgara nacia banko, Elena D. Vaskova, oticistino, Stefan Ŝkodrov, ŝtonĉizisto.

Varna. La esperanto-societo „Albatro“

aranĝis sian verdan semajnon laŭ jena programo:

1. La 12-an de novembro f-ino Veska Skolufanova prelegis je temo: „Esperanto kaj la junularo“ en legejo „Otec Paisij“.

2. La 14-an de novembro je la 12:30 h. tagmeze s-ino Vera Makedonska parolis antaŭ la mikrofono de Radio-Varna je temo „Esenco kaj signifo de esperanto.“

3. La saman tagon vespere je la 7 h. en la Ĉemara populara banko s-ro Marko Vălkanov parolis pri „Esperanto kaj ĝia praktika apliko“.

4. La 15-an de novembro je la 7 h. vespere en legejo „Hr. Botjov“ s-ino Vera Makedonska parolis pri „Esenco kaj signifo de esperanto“.

Излъзе отъ печатъ

**„ПРАКТИЧНА  
ГРАМАТИКА на ЕСПЕРАНТО“  
отъ Емилъ Стратевъ**

одобрена отъ Българския есперантски съюзъ съ протоколъ № 23. отъ 4. априлъ 1939. год. Необходимо ржководство за всѣки новъ и старъ есперантистъ.

**ЦЕНА 6 ЛЕВА.**

Доставя се отъ „СПИКТУР“ международенъ институтъ — 50, улица Алабинъ — София  
Приематъ се пощенски или герб. марки

ВСѢКИ ЕСПЕРАНТИСТЪ ТРѢБВА ДА ПРИТЕЖАВА

ПЪЛНИЯ

**ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАРСКИ РЕЧНИКЪ**

отъ АТ. НИКОЛОВЪ

обемашъ 500 страници, голѣмъ форматъ, съдържащъ всички въведени въ есперанто думи, които се намиратъ въ голѣмитѣ есперантски речници на свѣта, този речникъ представлява една малка есперантска енциклопедия. Неговото излизане е цѣло събитие въ живота на българското есперантско движение.

Цената на речника е 80 лв. До излизането му, обаче, ще струва за всѣки, който го предплати, само 60 лева.

Всѣки пѣкъ, който се абонира едновременно за речника и за есперантския вестникъ „Frateco“, ще ги има и двата за 65 лв.

Всичко изпращайте до Книгоиздателство „Б Р Я Т С Т В О“ — Севлиево

5. La 18-an de novembro okazis amuzvespero en la granda salono de societo „Junak“ kun riĉenhava programo.

6. La 19-an de novembro „je la 3 h. posttagmeze s-ino Mara Saralieva parolis je temo „Kio estas esperanto?“ en legejo „Prosveta“.

7. La 20-an de novembro vespere en lernejo „Sulini“, oni solene malfermis kurson por komencantoj; la kursgvidanto estas prezidanto de „Albatro“ s-ro Georgi Dimov.

Dum la tuta semajno oni disdonadis al la urbanaro flugfoliojn kun propaganda teksto. La urbo estis ornamita per belaj diverskoloraj afiŝoj pri la verda semajno, pri la amuzvespero kaj pri la kurso. La prelegoj, la paroladoj kaj la amuzvespero estis amase vizititaj. Dum la amuzvespero estis prezentata esperantlingve „Pristanala“ de Hr. Botjov. La vizitantoj havis la eblecon aŭdi teatraĵon en belsona esperanto kaj ekinteresiĝis pri ĝi. Ili jam estas kursanoj.

Inter niaj membroj regas granda entuziasmo. Dum la tuta verda semajno la verdstelanoj fervore kaj senlace propagandis sian ideon kaj gajnis multe da adeptoj.

V. S-va.

Вѣнчавка. Нашиятъ сътрудникъ Ив. Х. Кръстановъ се е вѣнчалъ въ родния си градъ Пирдопъ съ Зорка Н. Вражалиева отъ Свищовъ. Кумували сж г-нъ и г-жа Веселинъ Т. Влайкови.

S-ro D. R. Pook, C. A., 45 Richmond St., West, Toronto, Kanado, interŝanĝas poŝtmarkojn.

ПЪЛЕНЪ ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАРСКИ и БЪЛГАРО-ЕСПЕРАНТСКИ РЕЧНИКЪ съ ОСНОВНА ГРАМАТИКА НА МЕЖДУНАРОДНИЯ ЕЗИКЪ. III издание, 320 стр. съ предговоръ отъ проф. Д-ръ Ст. Младеновъ, одобрень отъ Мин. нар. просв., срещу 60 лв., подвързанъ 75 лв., праща съставителтъ: Ив. Х. Кръстановъ, ул. 6. септемврий 2, София (пош. чек. смѣтка № 4591).

Наскоро излиза подъ печатъ новиятъ каталогъ на „СПИКТУР“. Каталогътъ ще се изпраца безплатно при поискване.

Адресъ: „СПИКТУР“ — 50, ул. Алабинъ — София.

### Съидейници,

Касата на Българския есперантски съюзъ е праздна. Списанието излиза съ закъснение. Дейността на Управителния съветъ е затруднена. Не чакайте втора покана, а веднага пристъпете къмъ оживена дейность! Събирайте абонати на списанието! Изпрацайте членския вносъ въ Съюза! Само така ще превъзмогнемъ тежкитѣ времена и ще закрепимъ Съюза си! На работа!

„BULGARA ESPERANTISTO“ —  
monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.  
Adreso: 50, str. Aabin, Sofia, Bugarujo.  
Poŝtĉekkonto: 1133

JARABONO: Enlande — 20 bugl. levoj. Eksterlande—4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.  
Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon  
RESP. REDAKTORO: P. JORDANOV